


# La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

Espéranto :  
vers une culture sociale sans frontières.



## KAROTKAPO



**de Julio Renard'**

**Ĉu naskiĝo  
de nova  
Esperanta  
Pariza  
Teatro  
?**

Ĉu vi ne sukcesis havi la rolon de Sinjorino Lepiko ?

Ne. Ili dungis min kiel lokistinon, kaj mi havas kiel taskon memori, dum la interakto, ke oni pagu la kotizon kiel eble plej frue...

**prezentota okaze de la Ĉatorusa kongreso**

(Paĝo 12)



# Marĝene de l' Beria kongreso Tio, kion rakontas blazono...

67<sup>a</sup> kongreso  
de  
**SAT-Amikaro**  
Châteauroux  
Ĉatoruso



**ESPERANTO**  
senlima  
lingvo  
7<sup>a</sup>-10<sup>a</sup>  
aprilo  
2012



La fama «Château-Raoul»  
borde de la rivero Indro



Maketo de la Deola abatejo  
realigita laŭ arkivaj planoj.



La nur restanta sonoril-turo.

Deolo (*Deols*), urbeto najbara de nia onta kongresurbo Ĉatoruso, havas interesan blazonon, kvankam unuavide sufiĉe banalan:

Heraldike, oni ĝin priskribas tiel : *El gorĝo, kun tri traboj el oro kaj kun kapo el arĝento ŝarĝita de markiza krono.*

Rapida klarigo pri la fakaj vortoj : gorĝo, oro kaj argento estas koloroj, respektive ruĝo, flavo kaj blanko; kapo kaj trabo estas pecoj (geometriaj figuroj) respektive la supra horizontala bendo (blanka) kaj la tri internaj (flavaj).

Kio rimarkindas en tiu blazono, tio kuŝas en la fakto ke ĝi estas heraldike «falsa».

Kial ? Iu heraldika regulo (eĉ la plej konata nomata «regulo pri koloroj» tekstas «*Neniam farbo sur farbo, nek metalo sur metalo.*». Jen denove io kiu bezonas tradukon ! La heraldikaj «koloroj» estas dividitaj en grupojn. En la grupo «farboj» troviĝas inter aliaj la «gorĝo». En la grupo «metaloj» troviĝas «oro» kaj «arĝento». Nu, en la suba parto la «traboj» el «oro» troviĝas sur fono el «gorĝo», t.e. tute regule, metalo sur farbo. Sed sur la kapo (el arĝento) troviĝas krono el oro : do metalo sur metalo, tute malpermesita aranĝo !

Kial tiu stranga regulo ? Ĝi ne ŝuldiĝas al hazardo : la metaloj (oro, arĝento) estas helaj koloroj, dum la «farboj» (laŭke: ruĝo, bluo, nigro, verdo) estas densaj koloroj, kaj la regulo favoras la kontrastojn, kiuj ebligas pli bonan legadon. Ni ne forgesu, ke origine, la blazonoj uziĝis sur la batalkampoj por ke la batalantoj kaŝitaj en siaj ladaj armaĵoj sin identigu. Prefere oni ilin bone kaj rapide rekonu.

Tiu regulo plu uziĝas en niaj modernaj trafikpaneloj, kun - krom raregaj esceptoj, (kiel «ne parkumu») - la principo «Pri koloroj, neniam hela sur hela, nek densa sur densa».



Preskaŭ ĉiuj ŝildaj informistemoj uzas  
- eĉ se intue - la ses ĉefajn kolorojn de l'  
blazonoj kun ties regulo...

Tamen en la historio, aperis kelkaj eraraj blazonoj, kiujn oni ne priskribis «eraraj» sed


francilingve «à l'enquerre», kion oni traduku per «pri kiu oni informiĝu».

La ideo estis ke iu posedanto de blazono, precipe se li estas nobela kaj potenca, ne povas ne koni la heraldikajn regulojn, do se li elektis blazonon kun eraro, tio ne estas eraro, sed volo por altitiri atenton sur apartaĵon lian.

Fakte neniam kaj nenie, iu provis informiĝi. Kiam okaze de turniro heroldo anoncis blazonon «pri kiu endas informiĝi», ja ĉiuj bone sciis, ke tiu formulo estis nur ĝentila (aŭ singarda) maniero subkomprenigi ke la blazono estas fuŝa.

El tiaj blazonoj plej famas tiu de la reĝlando de Jerusalemo, farita nur el oro kaj el arĝento.

La legendo diras, ke tiu blazono signalas la grandegan orgojlon de la tiama reĝo de Jerusalemo (Gotfredo de Bujlono) kiu reĝas super ĉiuj leĝoj, inkluzive tiuj de heraldiko, kaj kies riĉeco povas akcepti nur oron kaj arĝenton sur la ŝildo.



Ni revenu al Deolo. Al kiu apartaĵo alvokas tiu «eraro»? Unue, ni konsideru la kronon. Ĝi estas markiza. Nu, Deolo neniam estis markizejo, la tiama (komence de la 10a jarcento) senjoro *Ebbes le Noble* estis nur speco de barono. La legendo rakontas ke li pilgrimis Jerusalemen kun sia feŭdestro Vilhelmo la Pia. Revenante, fortega ŝtormo minacis sinkigi la ŝipon. Ili votis, ke okaze de elsavo, ili donacos siajn posedaĵojn al Eklezio kaj al la malriĉularo. La vetero kompatis ilin, Vilhelmo kreis la abatejon de *Cluny*, kaj *Ebbes* tiun de Deolo, en sia deola kastelo. Ŝajnas ke li ne donacis sian tutan posedaĵon, ĉar li konstruigis kastelon en ekstera najbara loko, kaj tien instaligis kiel «princo».

Prosperis la loko nomita «*Château Raoul*» pro la multnombraj «Raoul» en la *Ebbes*-idoj, kiu fine aliformiĝis en *Châteauroux*. Intertempe, *Ebbes de Déols* iĝis *Ebbes de Châteauroux*, la Ĉatorusa baronejo iĝis grafejo en 1498, dukejo en 1627 kaj fine markizejo en 1743, dum Deolo restas Deolo, prapatro tamen vasalo de Ĉatoruso. Eĉ la potenca abatejo, el ŝtonoj reĝis ŝtonoj, post sekulariĝo en 1622 (ja *Condé* bezonis monon !) kaj uziĝis por konstrui domojn, pontojn, vojojn... El ĝi restas nur sonorilturo.

Kiam blazono havas kapon, ĉi tiu ofte aludas al la feŭdestro. Sendube la markiza krono rilatas al tio, kaj la blazono vole erara, ja diras ironie (aŭ spite) : «venu do informiĝi pri mia feŭdestro, kiu fakte estas mia prafilo !»

Serĝo S.



# 85-a SAT-KONGRESO

## Jalto 11.08. – 18.08.2012

# Bonvenon al la kongresurbo JALTO

- ♦ la ĉefurbo de Suda Bordo de Krimeo, loko de turismo kun multaj historiaj kaj naturaj vidindaĵoj
- ♦ la plej prestiĝa ripozloko de Ukrainio, Rusio, Belorusio
- ♦ historia loko de la fama jalta konferenco, kie fine de la dua mondmilito renkontiĝis la prezidantoj de Usono, Britio, Sovetunio, kiuj decidis fondi la Unuiĝintajn Naciojn
- ♦ la urbo, kie agis famaj Esperanto-pioniroj kaj kie ĉi-jare ni festos 120-jaran jubileon de la esperanto-movado en Jalto.

La kongreso okazos en ripozejo, kiu situas nemalproksime de la urbocentro. La kongresanoj loĝantaj en la ripozejo estos en aparta 3-etaĝa domo, kie preskaŭ ĉiuj ĉambroj estas 2-litaj kun oportunaĵoj (sed duŝejo kaj necesejo en unu ejo). Duono de la ĉambroj estas kun vastaj balkonoj. En la ripozejo estas kurac-diagnoza centro pri nespecifaj malsanoj de pulmoj, kormalsanoj, periferia nerva sistemo, ĉambro por aromoterapio. Kuracado estas senpaga.

### Provizora programo

#### 11-a de aŭgusto (sabato)

08.30	Akcepto de la partoprenantoj Ekskurso D1 tra la urbo por la alvenintoj (unua grupo)
14.15-17.15	(La Plenum-Komitato kaj Ĝenerala Konsilantaro kunvenos ptm)
19.15	Interkona vespero

#### 12-a de aŭgusto (dimanĉo)

10.00-12.30	Solena Malfermo / komuna fotado
14.00-16.00	"Politika kaj socia forumo"
16.00-18.30	Ekskurso tra la urbo D2 (dua grupo)
16.00-18.30	Plaĝo por dezirantoj
19.15	Teatra vespero

#### 13-a de aŭgusto (lundo) Tago de la urbo

09.15-13.15	Laborkunsido Ekskurso D3 al vilao-muzeo de Anton Ĉeĥov
14.15-18.00	Spektakloj de jalta E-teatro "Improvizado" laŭ rakontoj de A.Ĉeĥov
19.15-21.15	Prelego pri Krimeo kaj koncerto de Pavel Moĵajev
22.00	Spektado de fajraj salutoj okaze de la Tago de la urbo

## Enhavo

<b>SAT-Amikaro - Kongreso</b> Teatraĵo "Kartkapo" Tio, kion rakontas blazono Lastaj informoj Nur al riĉuloj oni pruntedonas	1,12 2 6 11
SAT-Kongreso Bonvenon en Jalto Provizora programo	3/4
<b>Analizoj/opinioj</b> Sankta-Livrado-sur-Mekongo Pri komunikado, instruado, lernado	4/5 10
<b>Lingvo</b> Kiel traduki : Trait Legindaj legendoj	7/8 10/11
<b>Libro-servo</b>	8/9
<b>Recenzoj</b> Libro vivas pli longe ol unu sezono Duope kaj Teame	9 14/15
Kontribuo al Vikipedio Kartkapo de Julio Renard'	12
<b>Humuraĵoj-diversaĵoj</b> E-kuiru. Selle-humuraĵoj HuMorelaj Linioj BD: La tribuloj 6 / Ĉe la lago 81	6 6,13 13 16
<b>Plu moviĝas la Movado - Le Mouvement en mouvement</b> Teatra staĝo Muzaiko, E en armor, Conférence Lanti Z-Festo Choisy le Roi, Paris	13 14 14/15 15/16

### Pliaj detaloj, Prezroj, Aliĝilo :

<http://www.satesperanto.org/1-a-kongresa-bulteno,2078.html>

aŭ mendu la numeron de Sennaciulo  
novembro-decembro 2011, n-ro 11-12  
(1277-1278)

ĉe SAT, 67 av. Gambetta FR - 75020  
satesperanto(cxe) free.fr



LA SAGO. CPPAP n° 0312 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Sénart.

Dépot légal à parution.

**Ĉefredaktanto :** Vito Markovo. **Enpaĝiganto :** Serĝo Sir'. **Redakt- kaj korekt-skipo :** Andreo Andrio, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir', **kun helpo de :** Francua' Dekurcelo, Janine kaj Yannick Dumoulin, Véronique Girard, Phil Guichet, Jorgos.

**Partoprenis en ĉi numero:** Andreo Andrio, Louis Gohin, Mireille Grosjean, Klod, Guy Martin, Yves Nicolas, Ĵak Le Puil, Mari-elen', Flora Markov, Vito Markovo, Lin' Morel, Jean Selle, Serĝo Sir', membroj de «ILO».

### Kontribuaĵoj Contributions

Ĉiam bonvenaj ! Sendu ilin al la redakta korespondanto:

Toujours bienvenues ! A faire parvenir au correspondant de rédaction:

**Serge Sire** (Serĝo Sir')

85 impasse des Fées 74330 Sillingy

Reto : [lasago@free.fr](mailto:lasago@free.fr)

■ Prefere per reto, **tekstoj** en RTF- aŭ TXT-formo por ligitaj dosieroj, skribitaj prefere en Unikodo, **bildoj** en TIFF-, JPEG- aŭ GIF-formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj **prefere** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku margene) Ne tajpitaj kontribuaĵoj publikeblas nur se volontulas iu tajpanto.

■ Artikoloj ricevitaj post la 20a de iu monato ne povas esperi aperigon en la numero de la sekvonta monato.

■ de préférence par internet, **textes** en format RTF ou TXT pour un document joint, et **images** en format TIFF, JPEG ou GIF.

■ éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (erreurs éventuelles notées en marge) Les articles manuscrits ne peuvent être publiés que si nous disposons de dactylos bénévoles.

■ Les articles reçus après le 20 du mois ne peuvent pas espérer être publiés dans le numéro du mois suivant.

**Pri la enhavo de la artikoloj respondekas la aŭtoroj mem.**

**Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto**





# Céline Pessoa

# Z-festo en la SAT-Amikara sidejo

## unua publika kantprovo en Esperanto far neesperantista artista paro (Adrieno kaj Sebastiano)

Bild-Delire ajn-raportis Sir' (el ajn-orde ricevitaj foto), do ĉia simileco kun efektive okazita evento k partoprenintoj estus ne tute hazarda, sed tute hazarda kompleta kongruenco...



Kion mi ekscias? Vi diris al via fratino, ke mi estas «posedema patrino», ĉu?

Efektive! Sed mi tuj bedaŭris...

...ĉar diplomate, tio estas ja mallertajo...

...kaj semantike, tio estas nur pleonasmo...

La Tri-buloj 6



ĉe la lago far Sir'

kroniko pri la ĉiutaga vivo en Anci' Epizodo 81

Kion mi vidas? Vi kuraĝis eldonigi la ĉi supran aĉan epizodon?

...kiu vere malbonege bildigas la patrino...

Kaj tra ŝi, mi sentas atakon kontraŭ mi... kiu tiom faris por vi...

...Kaj fine, mi kredas ke posedema fakte estas vi!...

Nu! mi min demandas ĉu ni ne enŝlimiĝas en iun karotkapo-sindromon?

